पूजा

Triparta Rito

Triparta rito
kun rifuĝoj kaj preceptoj

Namo Budhaja
Namo Dharmaja
Namo Sanghaja
Namo nama
Om, Ah, Hum.

1. Komenca saluto

Ni honoras la Budhon, la vekiĝinton antonomazie,
tiun, montranta al ni la vojon.

Ni honoras la Dharmon, la instruon de la Budho,
kiu gvidas nin el la mallumo al la lumo.

Ni honoras la Sanghon, la frataron de la budhaj sekvantoj,
kiu estas inspiro kaj gvido por ni.

2. Saluto al la Tri Juveloj

Ni honoras la Budhon kaj aspiras sekvi Lin.
La Budho estis homa estaĵo, same kiel ni.
Tion, kion la Budho superis, ankaŭ ni povas superi.
Tion, kion la Budho atingis, ankaŭ ni povas atingi.

Ni honoras la Dharmon kaj aspiras sekvi Ĝin,
korpe, vorte kaj mense ĝis la plenumo.
Ni aspiras studi, praktiki kaj kompreni
la Veron laŭ ĉiuj ecoj, la Vojon laŭ ĉiuj partoj.

Ni honoras la Sanghon kaj aspiras sekvi Ĝin,
la frataron de tiuj, laŭirantaj la Vojon.
Ĉar ni engaĝiĝas unuope sekvi tiun Vojon,
la Sangho kreskas kiel cirklo en senĉesa ampleksiĝo.

Saluto kaj rifuĝoj

Namo tassa Bhagavato Arahato Samma Sambuddhasa
Mi salutas la Benaton, la Laŭdindulon, la Pleniluminiĝinton
Namo tassa Bhagavato Arahato Samma Sambuddhasa
Namo tassa Bhagavato Arahato Samma Sambuddhasa

Buddham saranam gacchami
Mi rifuĝas en la Budho
Dhammam saranam gacchami
Mi rifuĝas en la Dharmo
Sangham saranam gacchami
Mi rifuĝas en la Sangho

Dutiyampi Buddham saranam gacchami
Dufoje mi rifuĝas en la Budho
Dutiyampi Dhammam saranam gacchami
Dufoje mi rifuĝas en la Dharmo
Dutiyampi Sangham saranam gacchami
Dufoje mi rifuĝas en la Sangho

Tatiyampi Buddham saranam gacchami
Trifoje mi rifuĝas en la Budho
Tatiyampi Dhammam saranam gacchami
Trifoje mi rifuĝas en la Dharmo
Tatiyampi Sangham saranam gacchami
Trifoje mi rifuĝas en la Sangho

Preceptoj

Panatipata Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Adinnadana Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Kamesu Micchachara Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Musavada Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Pharusavacha Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Samphappala Pavacha Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Pisunavacha Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Abhijja Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Byapada Veramani Sikkhapadam Samadiyami
Micha-dasana Veramani Sikkhapadam Samadiyami.
Sadhu, Sadhu, Sadhu.

Per bonkoraj agoj mi purigas mian korpon
Per senlima malavaro mi purigas mian korpon
Per trankvilo, simpleco kaj kontentiĝo mi purigas mian korpon
Per prava komunikado mi purigas mian parolon
Per ĝentilaj kaj agrablaj vortoj mi purigas mian parolon
Per kuraĝigaj kaj harmoniigaj vortoj mi purigas mian parolon
Aliigante la avaron al trankvilo, mi purigas mian menson
Aliigante la malamon al kompato, mi purigas mian menson
Aliigante la nescion al saĝo, mi purigas mian menson

3. Oferoj al la Budho

Por honori la Budhon, ni oferas florojn al Li:
florojn nun freŝajn, kiuj dolĉe malfermas siajn korolfoliojn,
florojn, kiuj morgaŭ estos sekaj kaj velkaj.
Nia korpo, kiel la floroj, ankaŭ pereos.

Por honori la Budhon, ni oferas kandelojn al Li:
al Li, kiu estas la Lumo, ni oferas lumon.
El Lia grandega lampo ni ekbruligas plian en nia eno:
la lampon Bodhi, kiu brilos en nia koro.

Por honori la Budhon, ni oferas incenson al Li:
incenso, kies aromo plenigas la medion.
La aromo de la perfekta vivo, pli dolĉa ol la incenso,
etendiĝas ĉien tra la mondo.

Mantroj

Om Amideva Hrih

Om Tare Tuttare Ture Svaha

Om Maitri, Maha Maitri Maitriye Svaha



Sabbe satta sukhi hontu